# *Kuba prezidento dankas subtenon de la usona popolo al Kubo fronte al la Kovim-19*



Havano, jul 22 (RHK) La unua sekretario de la CK de la Komunista Partio de Kubo kaj prezidento de la respubliko, Miguel Díaz-Canel, dankis hodia? la subtenon de la usona popolo, kiu sendis 6 milionojn da injektiloj por vakcinado kontra? Kovim-19 en la kariba insulo.

Per mesa?o en Tvitero, la ?tatestro elstarigis la fratecan agon kaj esprimis ke amba? landoj povas vivi pace kaj harmonie, konstruante pontojn kaj ne blokadojn.

> Agradecemos apoyo del pueblo norteamericano. Podemos vivir en paz y armonía, construyendo puentes y no bloqueos. https://t.co/Dz7sPnxobo
> — Miguel Díaz-Canel Bermúdez (@DiazCanelB) July 22, 2021

Li anka? aldonis materialon publikigitan de la gazeto Granma, kiu elstarigas la diferencon inter la sinteno de la usona movado solidareco kompare al tiu de la Usona Agentejo por Evoluo Internacia (Usaid), kiu la pasintan 30-an de junio anoncis financadon ?is du milionoj da dolaroj por projektoj kontra? la Revolucio, kio evidentigas la  enmiksi?on, kaj krome instigas al divido inter la kubanoj.

**Radio Habana Cuba**